

INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO

IPR

Eldonata de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 8

N-ro 3, 1978

Pizo, Italujo

ENHAVO

<i>Amadow Mahtar M'Bow — La lingva politiko de Unesko</i>	49
<i>Dario Bessenghini — Internacia Junulara Festivalo celas la kursfinintojn</i>	55
*** — <i>Interkonsento pri kunlaboro inter ILEI kaj UEA</i>	56
<i>Spomenka Štimec — En la lernejoj de Zagrebo</i>	57
*** — <i>IAdEM</i>	59
*** — <i>Konferenci en Lokarno</i>	60
*** — <i>Ferioj en neĝo</i>	62
<i>W. Krikke — La akuzativo — ĉu tiel terura?</i>	63
*** — <i>Infrandesegnaĵoj en Parizo</i>	65
*** — <i>ILEI en Gorico</i>	66
<i>Bruĉjo Kasini — Kelkaj ŝanĝoj en IPR</i>	72

La lingva politiko de Unesko

Parolado de s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko) ĉe la 13a Universala Kongreso de Internacia Federacio de Instruistoj pri vivantaj lingvoj. Lucerno, 13an de marto 1978.

S-ro Prezidanto, gesinjoroj,

Estas al mi plezuro kaj honoro ekparoli antaŭ tiu ĉi kongreso de Internacia Federacio de Instruistoj pri vivantaj lingvoj, kongreso organizita kun aktiva partopreno de Svisa Societaro de Instruistoj de vivantaj lingvoj, de Svisa Societo de profesoroj de 2agrada instruado, kaj de la Fondaĵo de Eŭropaj Centroj de lingvoj kaj civilizacioj.

Ĉi okaze permesu al mi diri, kiom mi ĝojas pro la fidemaj kaj fruktodonaj rilatoj, kiujn Unesko prizorgas kun Internacia Federacio. Tiuj rilatoj ebligis notinde aktivojn koncerne la instruadon al infanoj de enmigrintaj laboristoj, la Internacian Jaron de la Virinoj, kaj la diversigadon de la metodoj kaj teknikoj por instruado de duaj lingvoj. Tiuj ekagadoj, same kiel la internacia konkurso, kiun organizis via Federacio pri la rolo de la instruado de lingvoj en la batalo kontraŭ rasismo, sufiĉas por montri, ke niaj ambaŭ asocioj havas ne nur komunajn zorgojn pri edukado sed ankaŭ komunan etikemon. Pri tio mi estas ege kontenta, kaj mi deziras ke la rilatoj inter Unesko kaj via Federacio pli kaj pli oftiĝos por nia reciproka pliboniĝo.

Gesinjoroj,

Per via invito, ke mi parolu pri la lingvaj problemoj en la plurlingvaj socioj, vi montris vian intereson pri serio da demandoj tro ofte neglektataj, kiuj en tre multaj landoj rilatas ne nur al edukado kaj kulturo sed ankaŭ al politika, ekonomia kaj sociala sciencoj.

Verdire tiuj demandoj estas tiomaj kaj tiel vastaj, ke — sen tuŝi la fakon propre lingvistikan, kiu estas la via — mi devos pritrakti nur kelkajn aspektojn de la lasta el la tri grandaj temoj, kiujn vi metis en la tagordon.

Mia unua rimarko estas, ke la plurlingvaj socioj estas pli multnombraj ol la aliaj. De kiam ekzistas homoj apartigitaj, ĉu per geografiaj bariloj, ĉu per etnaj aŭ politikaj rivalecoj, kaj inverse, de kiam homoj, pace aŭ militeme ekmigras vole aŭ trude de kontinento al alia, de regiono de malsato al regiono de riĉeco, aŭ pli nuntempe de kamparoj al urboj, la Babela mito eniris la realecon spertatan de la plej multaj landoj.

Se tiu situacio vidiĝas ne ĉiam sufiĉe klara, tio estas, ĉar ĝin kaŝas la diseco de la evoluigaj kondiĉoj. En la plej industriaj regionoj de la mondo multaj ŝtatoj montras, ke ili efektive realigis sian lingvan unuecon. Sed tio rezultas plej ofte el longtempa historia evoluo, dum kiu unu lingvo finfine superis aliajn. Oni pensu ekzemple pri lando kiel Francujo, kie, post malrapida kaj daŭre pli forta triumfo de la *oil*-lingvo, tendenco al centrismo, — kiu estis sinsekve entrudita de la absoluta monarĥio kaj de “ĵakobinismo” — unuigis popolon je unu sola lingvo, pelante iom post iom idiomojn, dialektojn kaj regionajn lingvojn.

La *volonté de vivre en commun* (volo vivi grupe), laŭ la diro de *Renan*, fine venkis la lingvan partikularismon, kvankam tiu ĉi tute ne ankoraŭ mortis. Sufiĉos al mi rememorigi la forton, per kiu ambaŭflanke de landlimo, kiu dispartigas du ŝtatojn, kies lingvoj estas el la plej disvastigitaj en la mondo, viglas la vaska kaj la kataluna, memorigi ankaŭ la persiston de la kimra en Britujo aŭ la renaskiĝon de la gaela en Irlando. Koncerne Francujon, sufiĉas ankoraŭ mencii la reviviĝon de la bretona aŭ de la korsika. Tio ebligas ekde nun vidi, kiajn valorojn afekciajn, spiritajn kaj kompreneble kulturajn entenas ĉiuj lingvoj.

Eĉ en la industriaj landoj, kie la kreskado de amasinformiloj estas plia faktoro por lingva unuiĝo, kaj eĉ en tiuj el ili, kiuj posedas oficiale ununuran lingvon, ekzistas malofte perfekta koincido inter la limoj de la ŝtato kaj tiuj de la lingva grupo, tio des pli ke faciligitaj de modernaj transportiloj la movoj de la loĝantaro videble daŭradas. Kiu vojaĝanto en Usono — lando, kiu dum la dudeka jarcento pli potence kontribuis al disvastigo de la angla — hazarde turnante la ŝaltilon de radiaparato ne rimarkis elsendojn laŭvice hispanan, polan aŭ italan?

Koncerne la kazon de landoj oficiale plurlingvaj, ĝi meritas kompreneble apartan atenton. Pri ili unua konstato ŝajne kontraŭdira sin trudas. Unuflanke ĉiuj lingvoj estas egalaj laŭ respektindeco, ĉar ili esprimas plej profunde ĉiujn elementojn de la personeco de popolo aŭ de grupo, kiuj konsistigas ĝian kulturen identecon. Aliflanke interne de iuj el ili la lingvoj montriĝas ofte ege malegalaj inter si. Se en lando kiel tiu ĉi, kiu gastigas

kiuj ĉiuj atingis nivelon de teknologia erao, kiomaj estas la aliaj landoj, en kiuj sin alfrontas lingvoj, el kiuj kelkaj — ni devas tion konstati — estas fakte en stato de malforto. Plej ofte efektive la kunekzistantaj lingvoj plenumas sociajn funkciojn malegalajn, precipe kiam unu el ili havas skribitan statuton, kiun ne havas la aliaj. Krome tiuj ĉi lastaj estas ĝenerale en grado de evoluo, kiu ne ebligas al ili akiron kaj disdonon de la scio scienca kaj teknika de nia epoko. Ankaŭ ofte ili havas nur tre malgrande limigitan areon.

Sed tiu ĉi supra eldiro de la malavantaĝoj sufereblaj de lingvo estas ja nekompleta. Ekzistas foje sociaj kaj ekonomiaj tre fortaj premoj, el kiuj rezultas, ke “moderna” tre disvastigita lingvo estas kontraŭbatata, se ne intence almenaŭ fakte, de alia ankaŭ tre disvastigita lingvo. Tiel lingvoj jam de pluraj jarcentoj skribeblaj, kelkfoje parolataj de miliondekoj da personoj, sed ne povintaj ĝis nun transdoni entute la modernan sciencan penson kaj la alportojn de la teknika civilizacio, devas suferi pro la truda konkurenco de “enportitaj” lingvoj. Pri tio oni povas citi la ekzemplon de lingvoj parolataj en Hindujo jam de jarcentoj, kiujn konkurencas la angla.

Kvankam diserigitaj, tiuj rimarkoj sufiĉas por montri, laŭ mi, la egan malsimplecon de la lingvaj problemoj, kiuj ĉie, en evoluantaj kiel en evoluantaj landoj, aperas en plurlingvaj socioj.

El ĉiuj ĉi problemoj, unu, kiun mi jam mallonge aludis, sed al kiu mi deziras reveni, ĉar ĝi ŝajnas al mi gravega, estas tiu de la riskoj pri reciproka kontraŭstaro inter la esprimbezono de la kultura identeco kaj la postuloj de la ekonomia kaj socia elvolviĝo.

La lingva plurismo estas nur aparta kazo de kultura plurismo bazita sur demokrata principo de respekto al la personeco de ĉiu kaj de rajto de ĉiu memesti sen elporti ostracismon. Cetere la Universala Deklaro de la Homaj Rajtoj, voĉdonita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en 1948, proklamis, ke “ĉiu persono rajtas libere partopreni la kulturen vivon de la komunumo, ĝui la artojn, kaj kunlabori por la scienca progreso kaj ricevi la bonaĵojn, kiuj de tio rezultas. Same la Deklaro pri la principoj de internacia kultura kooperado, voĉdonita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en 1966, asertas, ke “ĉiu kulturo enhavas dignon kaj valoron, kiujn oni devas respekti kaj prizorgi. Oni povas cetere profiti el la grandegaj eblecoj, kiujn reprezentas la kultura diverseco en kadro de nacio, se oni konsideras, ke temas ne nur pri konservado de valora heredaĵo de scio, de praktiko kaj de valoroj, kiu eble baldaŭ malaperos se oni ne donas al ĝi vivon per integriĝo en la moderna fluo de la evoluo, sed ankaŭ pri faciligo de kontaktoj, kiuj povas esti ege frukto-donaj por ĉiuj. La rapida disvastiĝo de rimedoj por amase komuniki igas tiun taskon aparte urĝa. Ĉar ili fariĝis esencaj bazoj de la kultura disvastiĝo, tiuj rimedoj transsendas efektive mesaĝojn, kiuj ne estas kulture neŭtralaj, ĉar ili prezentas la penson, la ideojn, la valorojn, unuvorte la mondpercepton de tiuj,

kiuj ilin dissendas. Kiam ili veturigas perforte al lando aŭ al regiono de lando valor sistemojn fremdajn al la popolo de tiu difinita lando aŭ regiono, ili vole nevole povas fariĝi iloj por kultura perdiĝo.

Post tio jen dua aspekto de la problemo: ŝajnas al mi nedezirinde – sub preteksto protekti kulturon aŭ lingvon – konsili stagnadon, kiam tiom da popoloj, por kontentigi plej elementajn bezonojn pri nutraĵo, loĝejo kaj sano, devas uzi la rimedojn, kiujn ofertas modernaj scienco kaj teĥnologio. De tio venas baza kaj formala problemo, kiu estas mem parte lingva problemo.

La baza problemo estas, ke, same kiel la amasinformiloj, la aplikataj sciencoj kaj la teĥnologio ne estas kulture neŭtralaj, ĉar ili reflektas plej ofte la vivmanierojn de la socio, kiu naskis ilin. Por protekti la personecon de la popoloj necesas do certigi al la evoluo propran karakteron, por ke la enkonduko de la scienco kaj de la teĥnologio okazu en kondiĉoj, kiuj konservas la kulturajn tradiciojn kaj la profundajn valorojn de la ricevanta socio, kiam tiuj valoroj kapablas ebligi progreson.

La formala problemo venas de la neegala evoluo de la ĉeestantaj lingvoj. Tiu malegaleco necesigas du seriojn da solvoj. La unua utilas por modernigi la “malsuperan” lingvon, por ebligi, ke ĝi akceptu la sciencajn kaj teĥnikajn nociojn ĝis nun al ĝi fremdajn. Ekzemploj abundas, kiuj montras, ke tia adaptiĝo eblas. Sed evidente tiu procedo dependas de multaj faktoroj, kaj ĝin realigi estas des pli malfacile, ju pli la nombro de la lingvanoj estas malgranda.

La dua serio de solveblecoj koncernas la edukadon. Sperto akirita de proksimume dudek jaroj en plurlingvaj landoj, kiuj renkontis plej akrajn malfacilaĵojn, nome en tiuj ĵus elirintaj el la koloniado, alportis tiuokaze duoblan instruon. Unue, edukado donita de la komenco per lingvo tute fremda al la infano ne ĉiam bone sukcesas – por ne diri, ke eĉ ĝi tre ofte fiaskas. Ne nur ĝi trudas al la lernanto kondiĉojn tiel malfacilajn, ke ĝi kaŭzas gravajn mankojn en la lerneja laboro, sed plie ĝi estas faktoro de kultura perdo kaj de socia malordo. Tial la regulo devus esti: ĉiam uzi la gepatran lingvon dum la unuaj lernojaroj malgraŭ la obstakloj, kiuj estas kelkfoje tre grandaj kaj ne ĉiam venkitaj en pluraj landoj. Mi pensas precipe pri lingvoj, kiuj ankoraŭ ne sukcesis transpasi la parolan stadion. Ni devas laŭdi la grandajn strebojn jam faritajn por transiri de la parola esprimo al la skriba, kiel okazis en kelkaj plurnaciaj ŝtatoj, kiuj tiel povis sukcese gvidi grandajn kampanjojn por la alfabetigo, ĉar multaj estas la landoj, kies lingvoj estas nur paroleblaj. La klopodoj ankoraŭ necesaj, precipe en afrikaj landoj, devas esti kuragiĝitaj, kaj Unesko sin honorigas pro sia subteno. Oni bezonas ankaŭ interkonsenton pri la fonetika sistemo de transskribado, kiun oni devos uzi.

La dua instruo de la akirita sperto estas, ke en la plejmulto de plurlingvaj landoj necesas utiligi, kiel instruan perilon, ĉe la duagrada nivelo, kaj ankoraŭ pli ĉe la universitata, lingvon ne gepatran kaj prefere mondscale uzatan. Tia estas la neevitebla kompromiso, dum longa tempo, kaj en multaj kazoj, inter

la neceso protekti la propran kulturon kaj la postuloj de moderna progreso. Multajn klopodojn oni faras en pluraj landoj, por ke la vaste uzataj lingvoj adaptiĝu – per neologismoj – al la scienca pensmaniero. Ekzemple: la japana, la rusa.

Tamen estus eraro, se oni vidus en lernado de mondlingvo aferon nur utilcelan. Estus ja malbonfare, per edukado ne adaptita al la lokaj kondiĉoj, celi, ke ĉiuj infanoj ricevu instruon, kiu igus ilin homoj sen propra kulturo, sed estas dezirinde, eĉ necesege, ke ili havu rigardon al la mondo. El tia vidpunkto, vi profesoroj pri vivantaj lingvoj havas grandan taskon por faciligi la komunikadon kaj la interkomprenon inter homoj, kies reciproka malfido estas ofte rezulto de nescio.

Eble pri tio la mikrokosmo, kiu estas Unesko, povas alporti kelkajn sciigojn. Estas ja malfacile nombri la gepatrajn lingvojn de la oficistoj de la Sekretariejo, kiun mi havas la honoron estri, sed estas facile indiki la nombron de la naciecoj reprezentataj, t.e. 119. Tiu nombro verŝajne pli grandiĝos, ĉar, pro la instrukcioj, kiujn mi ricevis de la Ĝenerala Konferenco, kaj ankaŭ ĉar mi estas firme konvinkita, ke Sekretariejo de internacia organizaĵo devas havi geografian kaj kulturan bazon kiel eble plej larĝan, mi klopodas, por ke la tuto de membroŝtatoj, t.e. 144, estu reprezentota. Jam de nun oni povas vidi en la Sekretariejo de Unesko plurlingvan sacion, kie oni observas la kvaliton, kiun mi proponis por edukado, ĉar ĉiu oficisto, krom sia gepatra lingvo, posedas almenaŭ la francan aŭ la anglan, kiuj estas la du laborlingvoj de la Sekretariejo. Mi povas diri al vi, ke la rezultoj de tiu plurlingva kunekzistado estas la plej kontentigaj. Verdire la vorto “kunekzistado” estas ĉi tie tro malforta: pri ekipospirito mi devus ja paroli.

Se nun mi transiras de la Sekretariejo de Unesko al la interkonsilaj organoj de Unesko, kaj al la tre diversaj kunvenoj, kiujn ni organizas, mi faros analogan konstaton. Certe mi ne povas nei, ke la diskutoj estas foje malfacilaj, kiam iaj politikaj tiklaj problemoj aperas. Estus cetere mirinde, kaj fine ne dezirinde, se interregistara organizo povus ignori la tre gravajn problemojn, kiuj dividas, kaj kelkfoje disŝiras la mondon. Sed fine mi estas feliĉa atesti ĉi tie, ke ĝenerale superregas harmonio. Neniu forlasas sian kulturan identecon nek siajn politikajn opiniojn. Male la irado de la Organizo al universalismo donis eblon al pluraj grandaj kulturoj por lingve sin manifesti en kadro de Unesko. Se, dum la unuaj jaroj la nuraj oficialaj lingvoj uzitaj dum la kunvenoj estis la angla, la hispana kaj la franca, aldoniĝis poste la rusa, poste la araba, kaj pli lastatempe la ĉina. Dank’ al malsimpla, kaj ankaŭ multekosta, traduksistemo por la dokumentoj kaj la publikaĵoj, al samtempa interpretado por la parolaj intervenoj, oni povas vidi plurlingvismon en ago. Sed mi ne kaŝas, ke kelkfoje ekaperas malfacilaĵoj en samtempa traduko por redoni iajn esprimojn en alian lingvon. Kelkfoje la dokumentoj estas malfacile tradukeblaj, se la tradukisto ne estas specialisto.

Se mi volis aludi antaŭ lingvistaro iajn lingvajn aspektojn de la ĉiutaga funkciado de Unesko, mi ankaŭ deziras kapti la okazon por mencii mallonge la sintenon de Unesko, kiel specialigita institucio de Unuiĝintaj Nacioj, en fakoj eduka, scienca, kultura kaj komunika, pri problemoj ligitaj al via tagordo. Mi memorigos unue, ke, laŭ la terminoj mem de la artikolo unua de sia konstitua Akto, Unesko kontraŭstaras ĉiun diskriminacion bazitan sur la lingvo. En sia normigado kontraŭ ĉiuj formoj de diskriminacio, la Organizo akceptis plurajn konvenciojn kaj rekomendojn en rilato: kun la lukto kontraŭ la diskriminacio en instruado, kun la elvolviĝo de edukado por plenkreskuloj, kun la partopreno kaj la kontribuo de popolaj tavoloj en la kultura vivo. Tiuj tekstoj, kies iaj partoj aludas pri la problemoj de plurlingvismo, substrekas la neceson certigi la efektivan ĝuadon de rajto pri diversaj edukaj agadoj kaj pri la diverseco de la kulturaj kaj lingvaj esprimfortoj de la diversaj sociaj grupoj kunekzistantaj sur la sama teritorio, ĉu etnaj aŭ lingvaj malplimulto, ĉu enmigrintaj aŭ rifuĝintaj laboristoj.

Aliflanke mi deziras mencii la dekjaran planon por studado de parola tradicio kaj promocio de afrikaj lingvoj, kiun la Ĝenerala Konferenco de Unesko decidis en 1972 okaze de sia deksepa kunveno, kiel promocian ilon de elvolviĝo samtempe de kulturo kaj de edukado. Tiun planon konfirmis kaj precizigis unue la interregistara Konferenco pri la kulturaj politikoj en Afriko, kiu okazis en Akro en 1975, poste Konferenco de la Ministroj pri edukado de la afrikaj membroŝtatoj okazinta en Lagoso en 1976, kiuj ambaŭ markis decidan etapon en la koncepto de la lingva politiko en la afrikaj landoj esence plurlingvaj. Okaze de tiuj konferencoj la afrikaj landoj efektive decidis pri la grandaj orientiĝoj, t.e. la plurlingvismo kiel faktoro de paco kaj kunesto, la instruado estos farita per la gepatra lingvo de la infanoj malgraŭ la fakto, ke, se oni volus ĉiam instrui per la gepatraj lingvoj, malfacile estus havi lernejojn.

Ne volante fari katalogon de ĉiuj aktivoj de Unesko pri la temo, mi volus fine indiki kiel ekzemplon, ke la programo de la Organizo por la nuna periodo de aktiveco antaŭvidas notinde la organizadon, fine de aŭgusto ĉijare en Voltujo, de kolokvo por bilanci la aktivojn kaj la konojn koncerne la instruadon de lingvoj en plurlingva kunteksto kaj la publikigon de du studraportoj rilataj al evoluantaj landoj pri la problemoj de instruado de lingvoj en kunteksto de dulingvismo kaj de multlingvismo.

Gesinjoroj,

En tiu ĉi raporto devige nekompleta, mi ekzamenis la kazon de popoloj parolantaj lingvon de malplimulto aŭ lingvojn, kiuj ne sciis ĝis nun plene integri la sciencon kaj teĥnologian modernan terminaron, kaj bezonas ekkoni lingvon de pli granda diskoniĝo. Sed ni ne devas neglekti la malan kazon. La komunikado devas okazi ne en unu nura direkto, kaj tiuj, kiuj

havas la ŝancon havi, kiel gepatran lingvon, unu el la plej disvastigitaj lingvoj, devus sin gardi kontraŭ emo al facileco, kiu kondukus ilin al rifuĝo en la propra lingva mondo. La kono pri aliuloj, kiun alportas al ni la majstreco unu aŭ pluraj fremdaj lingvoj, estas pliriĉiĝo. Al vi ĉiuj, kiuj ĝuste laboras por riĉigi viajn samulojn, kaj por ebligi, ke ili sin pli bone konu kaj helpu reciproke, mi alportas la saluton de Unesko.

Mi deziras tutkore, ke via kongreso ebligu al vi transpasi novan etapon en via agado, valora agado, nepra agado, kiu en lasta analizo efektiviĝas por la profito de la tuta homaro.

INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO CELAS LA KURSFININTOJN

de Dario Besseghini

La granda deziro de Esperanto-instruisto estas vidi, ke post la kurso la lingvoleminto tuj ekpartoprenas renkontiĝojn kaj ekĝuas la Esperanto-kulturon. La Internacia Junulara Festivalo estis elpensita ĝuste por realigi tiun deziron. Tie, kursfinintoj kaj kutimaj ĉionpartoprenantoj renkontiĝas por interkonatiĝi kaj diskuti pri gravaj aspektoj de la kultura vivo de nia internacia komunumo. Venontpaske temos pri "Internaciaj kulturaj interŝanĝoj per muziko", kio estas temo sufiĉe interesa por vigligi la diskutojn kaj sufiĉe malpeza por ebligi la amuziĝon. La triafojeco de la aranĝo garantias sukceson — sed ankaŭ la freŝeco de la organiza komitato — tute novgeneracia — garantias originalecon. La renkontiĝo — okazonta en *Marina di Massa*, Toskanujo, de la 12a ĝis la 16a de aprilo 1979a — estos tre malfermita al la loĝantaro, kiu povos eĉ partopreni en kelkaj eroj. Sufiĉe da kialoj estas do por tuj verkigi al viaj gekursanoj leteron al "TEJ - Itala Esperantista Junularo — C.P. 210 — I-56100 Pisa — Italujo": kvankam la kunveno celas la plej flue parolantajn el ili, ankaŭ por tiuj, kiuj ankoraŭ iom lamas, estas bonega okazo por partopreni en unu el la du niveloj de la internacietosaj lingvaj kursoj aranĝataj dum ĝi.

interkonsento

PRI KUNLABORO INTER ILEI KAJ UEA

aprobita de la asembleo de ILEI en Sanmarino la 1976.07.28an
dum la 10a Internacia Konferenco

*ni represas la oficialan tekston de ĉi interkonsento
laŭ peto de la dana ILEI-sekcio*

1. Ambaŭ organizaĵoj konsentas pri la neceso de kunlaboro inter ili por progresigi Esperanton.
Tiucele ili plenumos la jenan agadon:
 - a) Konstantaj interrilatoj:
 - interkonsiliĝo en ĉiuj esencaj demandoj koncerne la instruadon de Esperanto;
 - komuna klopodo por atingi interŝtatan konvencion por la instruado de Esperanto;
 - interkontakto rilate al agadoj ĉe Unesko.
 - b) Partopreno de ILEI en Universalaj Kongresoj de Esperanto:
 - oficiala reprezentigiĝo;
 - informado pri la laboro de ILEI en la komitatkunsidoj de UEA;
 - ĝenerala publika kunveno pri temo, kiuj rilatas la instruadon de Esperanto;
 - ambaŭ organizaĵoj instigu al aranĝo de kaj partopreno en infankongresoj.
 - c) Partopreno de UEA en ILEI-konferencoj:
 - oficiala reprezentigiĝo;
 - informado en la laborkunsidoj de ILEI pri la laboro de UEA koncerne la edukadon;
 - kunlaboro en laborgrupoj.
2. La estraroj de ambaŭ organizaĵoj restas en regula kontakto kaj okazigas komunajn estrarkunvenojn laŭbezzone.
ILEI ne pagas la kutiman kotizon por asocio kunlaboranta kun UEA sed ambaŭ pagas la realajn administrajn kostojn je reciprokaj servoj ĝis ekvivalenta sumo.
Tiu ĉi interkonsento ne plu validas se unu el la organizaĵoj deziras ne daŭrigi ĝin. En tiu kazo necesas tri monata averto.

en la lernejoj de Zagrebo

de Spomenka Štimec

Dum la lastaj jaroj Internaciaj Junularaj Kongresoj spertas sufiĉe mult-nombran partoprenantaron el Jugoslavujo en la aĝo sub 20 jaroj. Temas pri ekslernejoj esperantigitaj en elementaj lernejoj de Zagrebo dum la lastaj kvin jaroj: ili elkreskis el elementaj lernejoj kaj fariĝis junaj movadanoj.

Por fariĝi esperantisto en elementa lernejo plej ofte ne sufiĉas unu sezono, nek unu jaro. Necesas pli longdaŭra flegado, kaj ofte nur lingvo-instruado ne montriĝas sufiĉe alloga por tiu aĝo.

Laŭ kvinjara praktiko ankaŭ ĉisezone en 10 elementaj lernejoj en Zagrebo infanoj lernas en kromhoroj Esperanton, kaj post la finita kurso partoprenas lingvan feriadon en eksterlando, en infana Esperanto-medio.

La instruanto ne ligiĝas nur al lingvo. Geknaboj dum instruhoroj estas instigataj okupiĝi ankaŭ pri teatra arto.

Zagrebo estas dum dek jaroj hejmo de Pupteatra Internacia Festivalo: PIF. Ĉe ties Esperanto-spektakloj lernejoj-kursanoj estas ilia plej fidela publiko, kiu ankaŭ dum siaj studhoroj kun ŝato okupiĝas pri pupteatro.

Fine de aprilo la urbeto *Vrbovec* gastigis centon da geknaboj, kiuj sur loka scenejo dum preskaŭ du horoj prezentadis siajn etajn pupprezentaĵojn en Esperanto. Kvankam ĉe multaj frazoj mankis akuzativo, tiu ĉi teatra tago alportis al la infanoj grandan ekscitiĝon. Plej grave estis partopreni kaj montri sian laboron... sed kompreneble pleje ĝojis la gajnintoj: la plej multajn poentojn gajnis por pupteatra prezento grupo el la zagreba lernejo *Viktor Bubanj*, dume en "drama" t.e. skeĉa arto al la infana ĵurio pleje plaĉis la ensemblo el *Karl-Marx*-lernejo. La renkontiĝo refoje montris, ke lingvo-instruado per si mem ne tiom allogas infanojn. Se ĝi estas akompanata per aldonaj aktivecoj, motivoj por esperantiĝo plifortiĝas.

Kiel unu el plej fortaj motivoj montriĝis tuja apliko de lingvo kun alilingvanoj: ĉijare gelemantoj el Jugoslavujo ferios ĉe kvar diversaj Esperanto-aranĝoj.

Taŭga lingva medio povas esti nur tiam plene kreita, se similajn aranĝojn partoprenas plurlingvaj samaĝuloj. Se surloke troviĝas nur anoj el du lingvoj rezultoj restas tro modestaj.

Ĉu aliaj instruistoj pretas feriigi siajn gekursanojn en infana Esperanto-medio? Kie? Zagrebo volonte tien direktus siajn geknabojn.

Reciproke eblus gastigi etajn eksterlandanojn dum Pupteatra Internacia Festivalo, en oktobro ĉiujare.

Kiuj instruistoj povus liberigi siajn infanojn de ĉiutagaj instrudevoj en lernejoj, kaj anstataŭigi ilin per organizitaj porinfanaj aktivecoj ĉe PIF? Bonvenaj estus grupetoj, kiuj ne nur lernas Esperanton, sed povus prezenti ankaŭ etan programon, ĉu pupteatron, ĉu dancan aŭ skeĉan.

Ĉefan parton de la programo en Zagrebo konsistigas ĉeesto al prezentaĵoj ludotaj fare de profesiaj pupensembloj el Bulgarujo, Ĉinujo, Hungarujo, Polujo, Italujo, Jugoslavujo kaj Rumanujo kaj prijuĝi ilin cele al elekto de la plej bona prezentaĵo el infana vidpunkto.

La invito al Zagrebo restas aktuala ankaŭ por la unua semajno de oktobro 1979.

IAdEM

La esperantistaj matematikistoj havas sian Asocion: IAdEM, kies celoj estas: unue studi universalan matematikan terminaron, kiu ĝis nun ne ekzistas, due rilatigi inter si la matematikistojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj.

Pluraj geinstruistoj, kvankam ili ne estas istoj pri matematiko, ŝatas de tempo al tempo matematikumi.

Por ili jen kurioza problemo aperinta en la lasta numero de la revuo de IAdEM, *Matematiko Translimen*.

FAMILIA ADICIO

Ĉiu litero anstataŭas ciferon. La sama litero ĉiam anstataŭas la saman ciferon, kaj malsamaj literoj nepre anstataŭas malsamajn ciferojn, kaj la adicio kompreneble estas ĝusta.

Bonvolu re-ciferigi ĝin.

PATRO +
PATRINO +
FILO +
FILINO =
FAMILIO

Por ĉiuj informoj pri matematiko ĝenerale kaj aparte pri IAdEM, skribu al nia sindonema amiko: *François Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, F-75016 Parizo.*

Konferenci en Lokarno

Lokarno estas malgranda urbo, proksimume 8 000 loĝantoj, en suda Svisujo, kaj troviĝas ĉe la norda bordo de lago *Maggiore* (prn: maĝore – “plej granda lago”). Lokarno apartenas al tiu svisa regiono en kiu la itala lingvo estas la ĉefa: Respubliko Tiĉino, sur kies teritorio kuŝas Lokarno, estas unu el la 26 kantonoj, kiuj kune formas la konfederacian ŝtaton Svisujon.

Lokarno estas turisma urbo kaj kiel tia ĝi troviĝas, kiel centro, en tre vigla turisma regiono, kies belecoj kaj ĉarmo estas famaj.

La kantonaj, urbaj kaj turismaj instancoj ĝojas, ke la 13a ILEI-konferenco okazos en Lokarno kaj kore bonvenigas ĝiajn partoprenantojn. La kantona edukdirektoro, inĝeniero Ugo *Sadis* estas alta protektanto de tiu konferenco.

Konferencejo.

Konferencejo estas la kantona lernejo, porinstruista, en Lokarno. La disponeblaj konstruaĵoj dividiĝas en du partoj. En la lernejo mem, kiu situas en la malnova parto de la historia urbo, estas rezervitaj la necesaj laborejoj (5 lernejoj ĉambroj, 1 granda ĉambro, sekretariejo, akceptosalono, kafejo kaj la necesaj teknikaj instalaĵoj). En tiu lernejo okazos la labora parto de la konferenco.

Restadejo.

Je 7-minuta promenadistanco de la Konferencejo troviĝas la Studenta Domo, kie loĝos kaj manĝos la konferencanoj. En la Studenta Domo estas rezervitaj 80 dultaj ĉambroj. La ĉambroj mem estas simplaj sed belaj kaj puraj. Akvo ne troviĝas en ili. La necesaj higienaj instalaĵoj (tualetoj, duŝoj, lavejoj) troviĝas sur ĉiuj etaĝoj en apartaj ejoj. Sur la tera etaĝo troviĝas granda restoracio, sekretariejo kaj du malgrandaj kunvenejoj, ĉio je dispono de la konferencanoj. La restoracion ni uzos por manĝi, sed ankaŭ kiel vespera

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ – I. L. E. I.

13a INTERNACIA KONFERENCO – Lokarno (Svisujo) – 19-28 julio 1979

ALIGILO

(Bonvolu skribi klare, legeble, laŭeble tajpe aŭ preslitere)

S-ro / s-ino / f-ino *
Familia nomo Antaŭnomo
Lando Naskiĝjaro
Loĝurbo
Strato n-ro
Samtempe aliĝas per aparta aliĝilo: edz(in)o
infano(j)

KOTIZOJ

ĝis 1979.05.31: tranoktoj kaj manĝoj ĉe moderna studenta domo, de la vespermanĝo de la 07.19 ĝis la matenmanĝo de 07.28, inkluzive, . sv.fr. 240,-
post 1979.05.31: samaj kondiĉoj sv.fr. 260,-
Ne membroj de ILEI devos aldoni al la supre menciitaj kotizoj la sumon de sv.fr. 20,- (ne pagenda de infanoj malpli ol 20-jaraj kaj familianoj).

Mi aliĝas al la Konferenco kiel: ILEI-ano / familiano / infano / ne ILEI-ano*,
kaj sendas sv.fr.
per poŝtĉekkonto n-ro 65/1060 “Banca Popolare Svizzera – Locarno”.

Dorse de la enpagilo nepre menci la konton: “224.666/0 ILEI.

Mi alvenos la per

Deziro de komuna loĝado kun s-ro/s-ino/f-ino
specialaj deziroj (laŭ ebleco)
dato subskribo

* – forstreku la ne konvenajn.

Laŭ la decidoj de la Maribora Konferenco en la jaro 1973a, ĉiun jaron, la 15an de novembro, la landaj sekcioj devas raporti statistike pri la diversaj lernejoj, en kiuj oni instruis Esperanton.

Per la ĉi-apudaj slipoj oni devas indiki la lernejojn, en kiuj okazis kursoj pri Esperanto ĝis la 15a de novembro 1978a.

Kompreneble, same interesos por ĝenerala statistiko pri la instruado de Esperanto, la indiko de la kursoj okazintaj ekster la lernejoj — ĉe Esperanto-kluboj, ĉe sidejoj de aliaj kulturaj organizoj ktp.

Ĉiu sekciestro kolektos la informojn el la diversaj urboj de la lando, kie okazis kursoj pri Esperanto, plenigos la enketilojn kaj forsendos ilin antaŭ la 31a de majo 1979a al la vicprezidanto de ILEI:

Johano Ingusz — Liget u. 40 — H-1120 Budapeŝto — Hungarujo

Oni devos plenigi apartan enketilon por ĉiu unuopa kurso; se ili ne sufiĉos, oni petu pluan provizon, aŭ uzu samformatan paperon.

Por ebligi la kiel eble plejan kompletecon de la enketo, ni petas ankaŭ ĉiun individuan ricevanton de IPR statistiki al la vicprezidanto de ILEI pri ĉiuj Esperanto-kursoj, pri kiuj li estas informita.

La pozitiva rezulto kaj konkreta sukceso de la jara statistiko dependos de la akurateco de la laboro fariota de la sekcistoj kaj de la unuopaj instruistoj en ĉiuj landoj.

Se ĉiu sekciestro kaj unuopa membro laboros diligente, ILEI havos ĉiun jaron fidindan statistikon pri la instruado de Esperanto en la tuta mondo, kaj la estraro povos transdoni ĝin, laŭ la interkonsento pri kunlaboro, al UEA, kaj ĝin uzi por informado kaj dokumentado de instruinstancoj en la diversaj landoj kaj de UNESKO.

Kursospeco: deviga
 nedeviga

Nivelo: elementa
 progresiga
 supera/literatura
 instrurajtiga

instruhoroj entute

komenca dato haltiga aŭ fina dato

ĉu aranĝitis fina ekzameno? jes ne

Temas pri: universitato supera lernejo
 mezgrada lernejo elementa lernejo
 klubejo privata domo

Raporto de
Informliveranto
Adreso

eventualaj klarigoj

Kursospeco: deviga
 nedeviga

Nivelo: elementa
 progresiga
 supera/literatura
 instrurajtiga

instruhoroj entute

komenca dato haltiga aŭ fina dato

ĉu aranĝitis fina ekzameno? jes ne

Temas pri: universitato supera lernejo
 mezgrada lernejo elementa lernejo
 klubejo privata domo

Raporto de
Informliveranto
Adreso

eventualaj klarigoj

Adreso de la instruejo
Adreso de la organizanta instanco aŭ persono
Adreso de la instruisto aŭ instruistoj
Uzita lernmaterialo (lernolibro, legolibro k.t.p. – indiku nur la devigan materialon: pri konsilitaj libroj kaj simile, vi povas aldoni apartan liston)

Lernantoj: kiom da lernantoj komencis la kurson?
kiom da lernantoj finis la kurson?
kiom da lernantoj ekzameniĝis?
kiom da lernantoj sukcesis en la ekzameno?

Minimuma aĝo de la lernantoj
maksimuma aĝo de la lernantoj
mezuma (averaĝa)* aĝo de la lernantoj

* por kalkuli la averaĝon de la aĝo, sumu la aĝon de ĉiu lernanto kaj dividu per la nombro de la lernantoj.

Adreso de la instruejo
Adreso de la organizanta instanco aŭ persono
Adreso de la instruisto aŭ instruistoj
Uzita lernmaterialo (lernolibro, legolibro k.t.p. – indiku nur la devigan materialon: pri konsilitaj libroj kaj simile, vi povas aldoni apartan liston)

Lernantoj: kiom da lernantoj komencis la kurson?
kiom da lernantoj finis la kurson?
kiom da lernantoj ekzameniĝis?
kiom da lernantoj sukcesis en la ekzameno?

Minimuma aĝo de la lernantoj
maksimuma aĝo de la lernantoj
mezuma (averaĝa)* aĝo de la lernantoj

* por kalkuli la averaĝon de la aĝo, sumu la aĝon de ĉiu lernanto kaj dividu per la nombro de la lernantoj.

kunvenejo. Eblos funkciigi memservan restadon je moderaj prezoj, tiel ke la konferencanoj ankaŭ dum la vesperaj horoj povas resti laŭplaĉe kaj senĝene, sen tempa limigo.

En tiu restoracio la konferencanoj ricevos ĉiujn manĝojn (matena, taga, vespera).

Aliĝo.

Ĉiu partoprenanto plenigu aliĝilon, aŭ samformatan paperon. La aliĝilo estu sendata al: *Esperanto, Poŝtfako 14, CH-6512 Giubiasco*, aŭ al: *Kurt Greutert, via Pizzo di Claro 7, CH-6512 Giubiasco*, kun samtempa pago al: *Banca Popolare Svizzera – Locarno – poŝtkonto 65-1060* (dorse de la enpagilo nepre menciui: “Konto 224.666/0 – ILEI”). Limdato por aliĝo kaj pago estas la 31an de majo 1979.

Kotizoj.

La aliĝkotizo por membroj de ILEI (kun abono al IPR) estas sv.fr. 240,-. Tiu sumo inkluzivas partoprenon al la ILEI-konferenco, tranoktojn kaj manĝojn en la Studenta Domo de la 19a vespere ĝis la 28a matene. Eventualaj ekskursoj estas aparte pagendaj. Pro la eksterordinare favora prezo ne eblas doni rabaton por ne konsumitaj manĝaĵoj aŭ ne uzitaj tranoktoj. Post la matenmanĝo la 28an de julio eblos veturi, trajne aŭ aŭtomobile, en proksimume tri horoj kaj duono, al la 64a Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno, tiel, ke por la tagmanĝo vi jam estos en Lucerno. Se ekzistas intereso, ni zorgos por komuna trajnveturado de Lokarno al Lucerno.

Ne ILEIanoj (respektive ne abonantoj de IPR) devas alpagi sv.fr. 20,-. Por aliĝoj post la 31a de majo 1979 plialtiĝos la kotizo de sv.fr. 20,-.

ILEIanoj: 1979 estos elektojaro kaj la komitato devos fari kelkajn gravajn decidojn. Ni ĝojas, ke tiuokaze ni povas oferti tian favoran restadon en bela svisa regiono. Pripensu, verŝajne neniam plu vi ricevos tian favoran oferton por pasigi kelkajn agrablajn kaj interesajn tagojn en la bela Lokarno. LKK kaj la ILEI-estraro kore bonvenigas vin.

FERIOJ EN NEĜO

kun junuloj kaj pliaĝuloj en bona junulara domo de svisa regiono

Dek ĉambroj kun du ĝis dek duetaĝaj litoj — du lavejoj — tri restadejoj por 40 personoj en ĉiu. Internacia etoso — uzo de Esperanto.

Adreso: *Haus Seen* — CH-7299 *Serneus* — tf. 0041-83-41477.

Partoprenos (ĉiun semajnon) 3 ĝis 5 familioj kun infanoj, 20 ĝis 30 junuloj ekde la dekkvara jaraĝo, ĉirkaŭ kvar gvidantoj kaj unu kuiristino. Ĉefgvidanto: *Manfred Schröter*, instruisto.

Infanoj ĝis inkluzive dektri jaraĝaj povas partopreni nur kun almenaŭ unu el la gepatroj, aŭ se la infanoj parolas Esperanton.

Prezo por tranoktado, matenmanĝo, vespermanĝo:

plenkreskuloj — 20 sv.fr. tage;

junuloj — 18 sv.fr. tage.

Infanoj ĝis inkluzive 6 jaraĝaj pagos nenion, ĝis 10 jaraĝaj duona prezo de la patro. Edzinoj kiel junuloj. Familioj ricevos apartan ĉambron. Dumtage estos proponata la prizorgo de la infanoj. Ĉiuj pagoj estas en svisaj frankoj.

Tempoj: 1. 1978.12.26 — 1979.01.01.
2. 1979.01.01 — 1979.01.07.
3. 1979.01.07 — 1979.01.13.

Oni povos partopreni unu aŭ du periodojn. Partoprenado de nur kelkaj tagoj ne eblos.

Limdato por aliĝo: 1978.12.01.

Foriro de *Unterkirnach*. Vojaĝo de *Unterkirnach* al *Serneus*: 15 sv.fr.

Por malproksimaj esperantistoj eblos unu senkosta tranoktado en *Unterkirnach* antaŭ kaj post la restado en *Serneus*, se bezone.

Adreso por aliĝi: *Katholisches Pfarramt — Kirchplatz 4 — D-7731 Unterkirnach* — tf. 0049-7721-54717.

Bonvolu ne antaŭpagi, sed vi pagos dum la ferioj en *Serneus*. Se ni povos akcepti vin, vi ricevos skriban certigon.

Programo: 7 - 8a matenmanĝo.

Dumtage libera tempo laŭvole.

18-19,30 tri elektelecoj:

— Esperanto-kurso por komencantoj;

— Esperanto-kurso por progresintoj;

— sonbildoj, filmoj kaj diskutado por ĉiuj, kiuj ne interesigas pri Esperanto.

20 Distra kaj kultura programo.

Por pluaj informoj turnu vin al unu el la organizantoj:

Ottolie Beck, Panoramaweg 2, Unterkirnach — tf. 51266.

Josef Schiffer, Fohrenweg 19, Unterkirnach — tf. 52323.

Bernhard Eichkorn, Kirchplatz 4, Unterkirnach — tf. 54717.

la akuzativo— ĉu tiel terura?

de *W. Krikke*

Esperantistoj ĉiam asertas, ke Esperanto estas tre facila lingvo kompare kun la naciaj lingvoj. Samtempe la plimulto de la esperantistoj regule eraras pri la akuzativo. Oni simple forlasas la literon "n" kaj inverse aldonas ĝin malĝuste. La akuzativo en la germana lingvo estas multe pli malfacila, tamen milionoj da germanlingvanoj uzadas ĝin korekte. Kiel klarigi ĉi tiujn fenomenojn, kaj kiel trovi plibonigan rimedon? Ĝenerale oni povas diri, ke ĉiu lingvoformo estas malfacila por iu al kiu tiu formo estas fremda. Tial homoj-sen-akuzativo trovas ĝin malfacila.

Kiel germanlingvanoj lernas korektan uzadon de iliaj akuzativoj? Unue ili aŭdas la lingvon dum la tuta vivo; due la lernejo instruas ilin dum multaj jaroj; trie ili legas la korektan lingvon ĉiutage. Ili do atingas rezultojn post multega ekzercado. Regi kian ajn lingvon ĉiam postulas multjaran seriozan praktikadon de la ordinara homo. Aŭskultu germanlingvanojn en kies hejma dialekto la akuzativo preskaŭ ne ekzistas kaj vi tuj povos konstati, ke ili uzas la formojn malpli korekte, depende de la grado de instruiteco. Aŭskultu la germanan lingvon de negermanoj, kiuj do studis ĝin en la lernejoj dum pluraj jaroj, kaj oni facile konstatas, ke ili preskaŭ seninterrompe faras erarojn. Mi mem instruis la germanan lingvon dum dudek jaroj al gejunuloj kaj, malgraŭ multthora cerbo-streĉo miaflanke kaj iliaflanke, la rezultoj estis tre modestaj, kvankam ambaŭ lingvoj, la germana kaj la nederlanda, estas tre parencaj.

La akuzativo en Esperanto estas almenaŭ tre regula, kiel la tuta gramatiko, sed la hodiaŭa pozicio de Esperanto estas sufiĉe malfavora, ĉar ĝi estas nur kromokupo al kiu oni kutime ne dediĉas sufiĉe da tempo. Tial estas nepre necese, ke la instruistoj de Esperanto klarigu la uzadon de la akuzativo plejble simple kaj malkomplike. Ĉisube mi donos koncizan provon, kiu naskiĝis el la praktiko.

Ĉiu frazo konsistas el:

- a. subjekto
- b. predikato
- c. komplemento.

1. La subjekto neniam havas "n".
2. La predikato, egalas al la subjekto kaj tial ankaŭ ne havas "n" (ekz: *Johano estas studento*).
3. Ekzistas komplementoj *kun* prepozicio kaj *sen* prepozicio. Komplementoj *sen* prepozicio ĉiam bezonas la "n", alie oni ofte pensas, ke ĝi estas subjekto (ekz: *Paŭlo batas Petron*).

Tiel la afero estas ege simpla, sed oni ne antaŭĝoju. Estas nepre necese, ke la instruisto konstante encerbigu ĉi tiujn ĉefregulojn al la lernantoj. Ĉiam denove li klopodu fari la aferon tutkomprenebla per multaj ekzemploj; la lernantoj ne tuj traduku, sed unue legu simplajn frazojn, dirante pri ĉiu substantivo, kio ĝi estas en la frazo: subjekto, predikato, komplemento kun aŭ sen prepozicio. Poste oni ankaŭ donu tekstojn bonstilajn, sed tute sen akuzativaj "n" kaj oni diru: "Nu, jen vi aldonu ĉiujn mankantajn akuzativojn per alikolora inko". Post tio la leganto regule traduku.

Multa ripetado estas necesa, eĉ ankaŭ por la jam progresinta esperantisto, sed la idealo estas atingebla, se oni nur persistas.

infandeseĝnaĵoj en Parizo

Tiu manifestacio estos kontribuo de la infanoj en la mondo al la Kontraŭ-rasisma Jardeko kaj al la internacia Jaro de la Infano deklaritaj de Unesko, kaj okazos ĉe la Kultura Centro *Pompidou* en Parizo.

La ĉefa temo de la ekspozicio estas: *Ne rasoj sed ni infanoj loĝas en la mondo*. Specifaj temoj de la ekspozicio estas:

1. Infanaj vizaĝoj el la tuta mondo.
2. Infanoj ludas kaj sin okupas.
3. Infanoj ĉiam lernas.
4. Infanoj manĝas.
5. Infanoj malsatas.
6. Infanoj en la hejma vivo.
7. Kiel infanoj vidas plenkreskulojn.
8. Kion infanoj plej deziras.
9. Infanoj aktoras.
10. Kiel infanoj festas.

Proceduro.

1. La temoj povas esti solvitaj per fotoj kaj desegnaĵoj.
2. La plej granda formato estu DIN A 3 (29,7 x 42 cm.), la plej malgranda formato estu DIN A 4 (21 x 29,7 cm.).
3. Oni metu piede de ĉiu ekspoziciaĵo afiŝeton dulingvan: nacilingvan kaj esperantlingvan.
4. La aĝo de la infanoj estu limigita de ok ĝis dekkvin jaroj.
5. Ĉiu infano, kiu kontribuis per desegnaĵoj aŭ fotoj, ricevos donace bildkarton pri la ekspozicio.
6. Oni tute ne estas devigata trakti ĉiujn specifajn temojn, nur tiujn kiuj plaĉas. Oni povas sendi tiom da desegnaĵoj aŭ fotoj, kiom oni volas; kompreneble, komisiono elektos la fotojn kaj desegnaĵojn ekspoziciendajn, zorgante pri kvalito (laŭ infana sed ne plenkreskula vidpunkto) kaj justa reprezentado de ĉiu nacio.
7. Ĝis la 1a de januaro 1979a, la materialo estu ĉe la kolektonto, nia konstanta reprezentanto ĉe Unesko: prof. James Fairbank, 6 avenue Théodore Rousseau, F-75016 Parizo (Francujo).
8. Post la Pariza ekspozicio, la materialo estos je dispono por pluaj ekspozicioj en la mondo.

ILEI en Gorico

Dimanĉe, 1978.08.20.

Je la 9a horo la konferencanoj vizitis la katedralon de la urbo por ĉeesti la celebron de la Sankta Meso: la diservo estis prezentita en la internacia lingvo Esperanto.

Post la diservo ĉiuj partoprenantoj de la Konferenco iris al la *Auditorium* de la urbo: tie okazis la inaŭguro de la 12a ILEI-konferenco. Infana dancgrupo *Lis Luzignutis* sub la gvidado de s-ino *Marisa Pavan*, prezentis folklorajn dancojn; la infanoj, knaboj kaj knabinoj estis vestitaj laŭ la regionaj kostumoj. Ĉiuj rigardintoj estis tre ravitaj per la ĉarma kaj gracia dancarto.

Poste ĉiuj kolektiĝis en la granda salono. La prezidanto salutis la gastojn kaj la konferencanojn. La ĝenerala sekretario aparte salutis la altajn gastojn kiuj estis la urbestro *rag. Pasquale de Simone*, la reprezentanton de la prefekto d-ro *Sabato Malinconico*, kabinetestro, la komandanto de la distrikto pri defendaj aferoj, generalo *Lauria*, la vickomandanton de la polico d-ro *Oreste Davini*; la komandanton de la karabinistoj, kapitano *Pasquale Maiorano*; la skabenon ĉe la Komunumo pri Kulturo, kav. *Ferruccio Fantini*; la prezidanton de la loka turisma entrepreno d-ro *Carlo Pellis* kaj la prezidanton de Gorica Esperanto-Asocio, *rag. Leone Furlan*. Krome, la ĝenerala

sekretario salutis la ne-esperantistojn itallingve.

La urbestro direktis al la aŭskultintoj afablajn salutvortojn kaj ankaŭ substrekkis la diversajn problemojn kaŭzantaj de la lingva diverseco. Li menciis, ke li helpis ĉiamaniere al la loka Esperanto-Asocio.

Alparolis la konferencan plurajn reprezentantojn; estis jenaj landoj: Aŭstralujo, Aŭstrujo, Francujo, F. R. Germanujo, Finnulo, Italujo, Jugoslavujo, Malagasujo, Sanmarino, Svedujo, Svisujo; krome, salutis reprezentantojn de jenaj esperanto-organizoj: TEJO, SAT, KELI, IKUE, IFEF, IEF, junulara Gorica grupo.

La sekvanta ero de la programo estis la prezentado de la Esperanta himno, fare de junulara ĥoro. La prezidanto prelegis pri la temo "La humanisma koncepto de d-ro L. L. Zamenhof".

Post la tagmanĝa paŭzo, je la 15,30 okazis la unua estrarkunsido. La estraranoj *Olle Olsson* kaj *Gaston Turin*, kiuj vizitis la UEA-kongreson, informis pri siaj impresoj de la kongreso; samopiniis pri la rezulto, kiu estis ĝenerale pli ol kontentiga.

Tiam la estraro kune starigis la tagordon kaj fiksis jenajn punktojn:

1. Financa buĝeto: la principoj por starigi finanĉan buĝeton.
2. Interkonsentoj kun IKUE, KELI

kaj FEOL.

3. Planitaj konferencoj: Lokarno, Tananarivo, Brazilujo kaj perspektive Aŭstralujo.
4. Ŝanĝoj en la statuto.
5. La organiza strukturo de ILEI.
6. La simpozio en Parizo.
7. Ekspozicio de infandeseĝnaĵoj, 1979.
8. Decido pri rekompenco de po 500 gm. al s-ro *Sonnabend* kaj d-ro *Dazzini*.
9. IPR: decido pri redaktoreco kaj ŝanĝoj en la administra farado.
10. Rezolucio.

Je la 20a horo okazis konferenca kunsido en kiu la konferencanoj fiksis la definitivan programon de la semajno.

Lunde, 1978.08.21.

Kunveno de la 9,30 ĝis la 12,30. Prelego kaj diskutado pri la unua fazo de la lerneja eksperimento en la dua regiono de ILEI. Prelegis *Helmut Sonnabend*, kiu skizadis kaj donis plurajn informojn pri la irado de la eksperimento.

Je la 15a horo, estrarkunsido. La estraro okupiĝas pri jenaj punktoj:

- a) simpozio en Parizo en la jaro 1979a, kaj la ekspozicio de infandeseĝnaĵoj, same en la jaro 1979a. Partoprenis la kunsidon s-ro *Fairbank*. Rilate al la simpozio en Parizo, li povis informi pri la pozitiva irado de la afero. La fako pri ĝenerala lingvistiko de la universitato *René Descartes* estas preta partopreni la protektadon de la simpozio. En septembro okazos la unua kunveno inter la direktoro s-ro *François*, s-ro *Fairbank* kaj d-ro *Lo Jacomo*. Temas nur pri unuaj kontaktoj, sed ne pri decidoj; ili estos faritaj kiam la prezidanto de ILEI, fine de oktobro, tiucele vizitos Parizon.
- b) S-ro *Fairbank* informis pri la nuna stato de la planita ekspozicio. La estraro interkonsentis kun li, en la kazo de refuzo fare de la Unesko-

komitato, ekspozicii en la Kultura Centro *Pompidou*. La estraro petis s-ron *Fairbank* jam nun informiĝi pri la eventuala uzo de ĉi tiu ejo. Perspektive la estraro antaŭvidos eventuale ekspozicii dum la ILEI-konferenco en Lokarno. La estraro, fare de la ĝenerala sekretario, informos denove la sekciojn, ke ili urĝe kaj energie zorgu pri la ekspoziciaĵoj el la propra lando. D-ro *Dazzini* ankaŭ petos la redaktoron de la revuo *Esperanto* de UEA aperigi nian alvokon en sia revuo. Provaĵoj pri trafa aŭto estis prezentitaj, kaj pri la elekto de la plej taŭga ankoraŭ estos decidite.

De la 17a ĝis la 19a horoj estis nova kunveno de la konferencanoj, sub la temo "Per Esperanto instrui fremdajn lingvojn". Estis donitaj ekzemploj en la itala, malagasa kaj finna lingvoj. Apartan intereson trovis la malagasa kaj finna.

Poste en amika rondo, oni aŭskultis kelkajn rakontaĵojn ĉe la kameno flanke de la konferencanoj.

Marde, 1978.08.22.

Je la 10a horo okazis la t.n. "Ronda tablo". Oni pritraktis la temon "Instruado de fremdaj lingvoj kaj Esperanto". Aktive kunagis en ĉi tiu rondo: por Finnulo s-ino *Clemola*, por Aŭstrujo s-ino *Linz*, por Svedujo s-ino *Andersson*, por Jugoslavujo d-ro *Zlatnar*, por Malagasujo s-ro *Raveloson*, por F. R. Germanujo rektoro *Sonnabend*, por Hungarujo s-ino *Formaggio*, por Italujo d-ro *Dazzini*, por Sanmarino prof-ino *Michelotti*, por Aŭstralujo s-ino *Einikovici*, por Francujo prof-ro *Fairbank*; krome estis la Asesoro pri instruado kaj kulturo de la Komunumo de Gorico, kav. *Fantini*, la Asesoro pri transportoj kaj trafiko de la Regiono, du instruistinoj pri germana lingvo, *Franca Zambelli* kaj *Franca Sancin*, kaj ĵurnalistino de la loka gazeto *Il Piccolo*. Gvidis la diskuton Bruĉjo Kasini.

Post enkonduko en la temon fare de

d-ro *Dazzini*, la asesoro s-ro *Fantini* petis informojn pri la lerneja stato de Esperanto en la diversaj landoj: kombine kun tiuj ĉi informoj la landaj reprezentantoj donis superrigardon pri la fremdlingva instruado. Montrigis, ke la lingva egemonio estas apenaŭ interrompita: regule oni instruas en ĉiuj landoj la anglan, germanan, francan aŭ, en orienteŭropaj ŝtatoj, la rusan lingvojn.

La raportantoj konstatis, ke la rezultoj de fremdlingva instruado ne estas kontantigaj, sed ĉiam estas observeblaj la rezultoj pere de Esperanto, kiam ĝi estas instruata. La diskutado al kiu nun partoprenis la aŭskultantoj, evidentigis ke la fremdlingva instruado nun neniel solvas la sociajn problemojn inter la najbaraj lingvoj. La tezon apogis ankaŭ ambaŭ asesoroj de la urba komunumo kaj de la regiono, kiuj promesis ĉiam doni aktivan apogon.

La dua kunveno okazis je la 15,30 ĝis la 18,15. Pri la antaŭvidita temo pri Afriko mallonge prelegis s-ro *Raveloson* el Malagasujo, pri la temo "Kiamaniere Malagasujo solvas siajn edukajn problemojn". Leviĝis tre vigla diskutado, ĉar montrigis ke la lerneja cirkonstanco en Malagasujo – pro siaj ne kompareblaj nesufiĉoj – kaŭzas tie tre malaltan populklerecon; pli ol la duono de la infanoj ne vizitas lernejon pro la fakto, ke en la tuta lando mankas lernejoj kaj instruistoj; eĉ en la urboj oni devas helpi sin en la instruado pere de sukcesintaj studentoj de superaj lernejoj; 60 ĝis 70 infanoj en unu klasĉambro estas preskaŭ regule. Kunlige kun la demando, ĉu la evoluhelpo fare de la eŭropaj ŝtatoj decide povas influi pli bonan iradon, estis la konstato, ke tiu ĉi helpo ankoraŭ absolute ne sufiĉas. La salajra mizero de la instruistoj estas signifa: proksimume 200 gm. monate!

En la sekvinta podia diskuto partoprenis por la kolora raso s-ro *Raveloson* kaj s-ro *Rakotondravao*, por la blanka raso d-ro *Dazzini* kaj d-ro *Zlatnar*. Gvidis la diskutadon la prezidanto *Sonnabend*.

La demando estis, ĉu ekzistas lingva imperiismo en Afriko: ĉiu el la unuopaj sinjoroj prezentis sian propran opinion. Poste la aŭskultantoj demandis pri diversaj punktoj de la prezentitaj opinioj. Montrigis, ke lingva imperiismo ne povas esti simple disigita de imperiismo ĝenerale; kiam ankaŭ ne plu regas rekta imperiismo, oni ankoraŭ ĉiam espluatas la iamajn koloniitajn popolojn, ekzemple per komercaj kaj negocaj aferoj, aŭ por atingi politikan influon.

Vespere la konferencanoj vizitis konatan socian vinuzinon, kaj ĝuis tie la prezentadon de folkloro dancgrupo *Danzzerini di Lucinico*. Ĉio okazis en *Cervignano*; la dancgrupo ekvivas tipajn dancformojn de la regiono, kaj impresis aparte per siaj elegantaj delikataj kaj harmoniaj dancformoj kaj ritmoj. Ne nur la okuloj ĝuis, sed ankaŭ la gusto: ĉiuj estis regalitaj per bona vino kaj bongustaj manĝaĵoj.

Merkrede, 1978.08.23.

Matene je la 9a horo, grupo de konferencanoj (partoprenis la estraro, s-ro *Eiconovici*, s-ro *Raveloson*, d-ro *Zlatnar*, s-ro *Marcetta*, d-rino *Zumin* de la loka organiza komitato), akompanataj de la skabeno pri kulturo kaj edukado de la Komunumo, kav. *Fantini*, vizitis en Triesto la prezidanton de la regiono *Friuli - Venezia Giulia* (Furlanujo - Julia Venetujo), adv. *Antonio Comelli*; la delegitaro estis akceptita en la oficiala palaco de la regiono. Dum la kunveno ankaŭ estis la asesoroj pri instruado kaj kulturo d-ro *Alfio Mirzao* kaj pri transportoj s-ro *Giovanni Cocianni*. La celo de la vizito estis prezenti kvin gravajn petojn, kiuj koncernas la esperantistan laboron en tiu-ĉi regiono. La petoj estis:

1. Ĉu eblus havi decidon de la regiona konsilantaro celante ĉesigi la nunan diskriminacion pri la internacia lingvo Esperanto, petante, ke oni

instruu ĝin en la lernejoj de la regiono kiel vehiklon kaj propedeŭtikan ilon por la lernado de fremdaj lingvoj.

2. Ĉu eblus enkonduki Esperanton en la fakultaton pri lingvoj ĉe la universitato en Udeno, starigante katedron pri Lingvo kaj Literaturo Esperanta.
3. La 12a ILEI-konferenco petas, ke la regiono certigu financhelpojn al la Esperantistaj grupoj ekzistantaj en la regiono, konsiderante, ke ili celas solvi problemon de grava kultura kaj socia valoro en landlima regiono.
4. Same la Konferenco petas, ke la regiono starigu, kune kun la najbaraj jugoslavaj kaj aŭstraj regionoj, eksperimentajn kursojn en kelkaj elementaj, mezgradaj kaj superaj klasoj por la lernado de la internacia lingvo Esperanto.
5. Ĉu la regiono povus helpi, ke en la kadro de la porinstruistaj kursoj oni starigu ankaŭ kursojn por instruistoj, kiuj deziras perfektigi en Esperanto?

La prezidanto respondis al la unuopaj punktoj: pri la unua punkto, li diris, ke la regiono ne kompetentas pri instruaj aferoj, tamen samopinias kun ni, ke Esperanto ne devas esti diskriminaciata.

Pri la dua punkto, li respondis, ke estas ja eblecoj fari proponojn ĉe la nove fondita universitato, ĉar nun oni devas kunsidi kaj decidi pri la fakaj programoj. Li intencas fari koncernan proponon.

Pri la tria punkto, ekzistas ankaŭ nun bonaj ŝancoj konsideri financajn subvenciojn al la Esperantistaj grupoj, ĉar la koncerna leĝo estos renovigita.

Pri la kvara punkto li respondis, ke ankaŭ tie ĉi kompetenteco estas de la ŝtato, tamen ekzistas trilanda komisiono pri kulturo kiu eventuale okupiĝos pri eksperimenta instruado en la lernejoj.

Pri la kvina punkto li opiniis, ke ankaŭ pri tio la ŝtato devas decidi. La plej interesa fakto estis, ke la prezidanto

konfesis, ke li por la unua fojo estis rekte alkonfrontita kun Esperanto.

ILEI donacis – je rememoro al la invito – la libron *Frihthof-Sagao* de *Esaias Tegnér*, en la dulingva eldono kun traduko esperantlingven farita de s-ro *Wilhelm Theodor Oeste*, numeron de *IPR* kaj traktajon en la itala lingvo pri la eduka valoro de Esperanto. La samon ricevis ankaŭ la asesoro pri kulturo kaj eduko.

Revenante al Gorico, la estraro aŭskultis s-ron *Raveloson* kaj s-ron *Rakotondravao*. Konataj estas nuntempe jenaj faktoj. La kostoj por dektaga restado, laŭ la momenta financa situacio estas 4437 fr.fr.; la kosto inkluzivas la flugadon kaj restadon en hotelo *Hilton Madagaskar*. Plue estas konataj la kostoj pri la daŭra dektaga restado en dulita ĉambro: 134 fr.fr., kaj en unulita: 178 fr.fr. por tago. Ankoraŭ ne estas konata la decido pri permeso de la konferenco fare de la registaro. Same mankas informoj pri la precizaj lokoj de niaj ekskursadoj, kaj pri ties kostoj.

La estraro unue tiam rekomendos al ĉiuj membroj la konferencon en Malagasujo, kiam ĝi estos konvinkita, ke ne estas iu ajn risko por la konferencanoj.

Posttagmeze, je la 19a estis kunveno de ĉiuj por aŭskulti la informojn pri la dua fazo de la lerneja eksperimento en Malsupra Saksujo. La nova vidpunkto de tiu ĉi eksperimento estas lingvo-orientiĝo en fremdaj lingvoj, tio estas, ke la lingvo-orientiĝo malfermas al la infanoj ekkonon de fremda lingvo kaj konscion pri la strukturo kaj memkonstato pro la propra talento eklerni fremdajn lingvojn.

Sonnabend pruvigis, ke tiu ĉi orientiĝa lingvo devas esti Esperanto. La aŭskultantoj estis tre interesitaj kaj samopiniis, ke tiu ĉi nova termino povas doni tute alian aspekton de la argumentoj.

Vespere je la 21a horo, s-ro *Raveloson* prezentis filmon kaj lumbildojn pri Malagasujo. Li kombinis la prezentadon kun konciza superrigardo de historio kaj popolo de la lando.

Saŭde, 1978.08.24.

Okazis la tuttaga ekskurso al Akvilejo kaj Civaldo. Oni povis viziti la riĉajn artaĵojn de la du urboj, kun Esperanta gvidado kaj interpreto.

Vespere je la 21a horo la tradukisto de la libro *Frithjof-Sagao* de *Esaias Tegnér*, s-ro *Wilhelm Theodore Oeste*, enkondukis la aŭskultantojn en siajn tradukajn tekstojn kaj klarigis kiamaniere li laboris. Tiel li donis impresojn pri la tradukaj rimedoj por bone trafi la sencon de la originalo.

Vendrede, 1978.08.25.

Ekde la 9a horo estis la konferenca Komitata kunsido. Jenaj punktoj estis traktataj: unue la raportoj de la sekcioj; due nova organiza strukturo de ILEI; trie novaj statutŝanĝoj. Posttagmeze okazis vizito de la urbo fare de la Konferencanoj. Dum tiu ĉi periodo la estraro kunsidis.

Je la 12a horo okazis akcepto fare de la urbestro en la urbodomo. La urbestro esprimis sian dankon pro la konferenco en urbo Gorico kaj esprimiĝis tre favore al Esperanto, opiniante, ke Esperanto devas resti sur la tagordo ĉiam konstante. Konkrete li pruvis sian intereson per diskonigo de la urba halo kaj per subvencioj por la konferenco kaj per flagoj en la stratoj de la urbo.

Ankaŭ estas menciinde, ke dum la daŭro de la konferenco, pendis rubando kaj flagoj super la strato, kaj ĉie en la urbo estis aŝiŝoj, kiuj atentigis pri nia konferenco.

Por la unua fojo en niaj konferencoj la urbestro distingis la prezidanton de ILEI per urba medalo.

La prezidanto tutkore dankis al la urbestro pro lia granda atentemo kaj bonvolemo, kaj transdonis donace libron *Frithjof-Sagao*; la samon ricevis la ĉeestanta skabeno pri edukado.

Vespere je la 21a horo okazis por la partoprenantoj de la 12a Konferenco, rolklora vespero: dum ĝi estis prezentitaj kvin ĥoroj kaj du gitorsolistoj. La ĥoroj

kantis tre tipajn kantojn de la diversaj provincoj de la regiono. Precipe notindaj estis la prezentado de la ĥoro de la infanoj kaj de la miksitaj ĥoro el la urbo Gradiska. Post la prezentado la loka Esperanto-Asocio regalis ĉiujn ĉeestantojn per vino, glaciaĵoj, bulkoj ktp.

Sabate, 1978.08.26.

Ekde la 9a horo estis la dua konferenca kunsido, dum kiu estis traktitaj la restaj punktoj de la tagordo, kiel raportoj de la estraro, demandoj al la estraro, lingva simpozio en Parizo, mondespozicio de infandeseĝnaĵoj en Parizo. La konferenco decidis rezolucion pri la lingva demando en la mondo, kiu estis akceptita unuanime. Samtempe la estraro atentigis, ke tiu ĉi rezolucio devas esti nacilingve kaj sendita al ĉiuj registaroj, petante respondon. Ĉiu sekciestro sendu kopion de la traduko kaj kopion de la letero al la registaro, al la ĝenerala sekretario por preni ilin en nia arĥivo. Je tagmezo la prezidanto fermis la oficialan parton de la konferenco.

Estrarkunsidoj.

Okazis entute kvar estrarkunsidoj: dimanĉe 08.20, je la horo 15,30 ĝis la 18a; lunde 08.21, je la 15a ĝis la 17a; vendrede 08.25, je la 16a ĝis la 18a kaj sabate 08.26, je la 16a ĝis la 18a.

Konferencoj – S-ro *Greutert* raportis al la estraro la nunan staton de la 13a Konferenco en Lokamo. Jam estas fiksitaj la kostoj de 240 sv.fr. de la 19a ĝis la 28a de julio, kaj la konferenca loko: kiel kutime, ĉio okazos en la sama konstruaĵo. La estraro dankis al s-ro *Greutert* kaj decidis, ke s-ro *Greutert* kune al inspektoro *Bertolini* organizu nian konferencon.

Pri la 14a Konferenco en Tananarivo, la estraro decidis atendi la aprobon de la konferenco mem, fare de la Malagasa registaro.

La estraro konsideris la nunan organizadon de kasaj aferoj, kaj decidis, ke la kasisto s-ro *Olsson* ellaboru gvid-

lion, kiu celos prezenti ĉiun jaron buĝeton al la komitato; kombine kun tiu financa flanko, la estraro aprobis la rekompenson de po 500 gm. al *Helmut Sonnabend* kaj d-ro *Mario Dazzini*, pro la vojaĝkostoj al Malagasujo; la decido estis unuanima. Plie la estraro decidis pagi la restadkostojn en Gorico por s-roj *Raveloson* kaj *Rakotondravao*. La malagasaj samideanoj, kiuj vizitis Eŭropon por varbi por nia konferenco en Tananarivo, ne havis la rajton kunporti la pagrimedojn. Plue la estraro decidis pruntedoni monon por vojaĝe atingi Parizon; tiu ĉi sumo estis limigita al 150 000 liroj, kaj estos repagenda en la jaro 1980a en Tananarivo, kiam okazos la 14a Konferenco.

La estraro traktis la interkonsenton kun IKUE kaj aprobis ĝin. Por havi interkonsenton de kunlaboro kun KELI, s-ro *Olsson* prezentos al la estraro de KELI modelon de la interkonsento, kiu similas al la interkonsento kun IKUE.

Jam estas duonfiksita interkonsento kun TEJO: por fiksi definitivan interkonsenton, la ĝenerala sekretario kontaktiĝos kun TEJO.

La prezidanto prezentis sian deziron havi interkonsenton kun FEOL: la estraro, post longa diskutado, decidis prokrasti tiel longe eblan interkonsenton

ĝis la cirkonstancoj estos por ĝi sufiĉe klaraj.

IPR – Estos ŝanĝo en la administrado de *IPR*. La estraro decidis:

- a) ke la reststoko de *IPR* restu en Pizo kaj s-ro *Kasini* tenos ĝin.
- b) ekde la jaro 1979a *IPR* estos sendata rekte al la abonantoj; tio signifas, ke la sekcioj nur respondecas sendi ĝustatempe la liston de la abonantoj al la kasisto, kaj indiki la pagon kaj samtempe ĝiri la monon en la ILEI-kason. *IPR* estos dissendita fare de s-ro *Kasini* unue tiam, kiam li ricevos la liston pere de la kasisto;
- c) ekde la jaro 1979a estos du redaktoroj: redaktoro, kiu respondecas pri la enhavo (faka redaktoro) kaj la redaktoro pri ĉiuj teĥnikaj aferoj (teĥnika redaktoro). La faka redaktoro estos *Helmut Sonnabend* kaj la teĥnika redaktoro estos *Bruĉjo Kasini*, tio signifas, ke la teĥnika redaktoro akceptos kaj aperigos ĉiujn manuskriptojn subskribitaj fare de la faka redaktoro.

La nova organiza strukturo de ILEI postulas kelkajn preparlaborojn: tiucele la prezidanto petis s-ro *Turin* prezenti ellaboritan proponon. S-ro *Turin* estas preta fari la laboron.

REZOLUCIO

La 12a Internacia Konferenco de ILEI, okazinta de la 19a ĝis la 27a de aŭgusto en Gorico, – kiel jam ofte aliloke – konstatis en tiu ĉi regiono la lingvan problemon, kiu malfaciligas la sociajn rilatojn inter la popoloj. Tiucele la Internacia Ligo prezentis konstante sian proponon, ĉiam sub la vidpunkto kontribui al tiu ĉi grava demando por solvi la lingvan problemon kaj tute ne altrudante la internacian lingvon Esperanto.

Tamen, konstatante ke la registaroj ĝis nun neniam publike prezentis iajn solveblecon, ILEI demandas, ĉu la registaroj:

- jam konstatis la distorditan staton rilate la interkompreniĝon inter la ŝtatoj kaj se jes, kiamaniere ili konsideras kontribui al la solvo de la lingva problemo en la rilatoj inter la popoloj;

- intencas proponi sian propran lingvon, ekzemple por la eŭropa komunumo, kiel komunan lingvon, aŭ sub priatento de la homaj rajtoj, estimante ĉiujn lingvojn, por eviti lingvan kaj kulturalan diskriminaciojn, proponi neŭtralan lingvon.

La geinstruistoj membrigantaj en nia Ligo konscias, ke la gelemantoj en la diversaj lernejoj de la mondo ne estas sufiĉe preparataj por respondece partopreni, kiel estontaj plenkreskuloj kaj civitanoj, la internaciajn taskojn kaj interrilatojn, ĉar la nuna sistemo de fremdlingva instruado ne kapablas plenumi la postulojn de la estonteco.

Unuanime aprobita de la 60 delegitoj el 14 landoj partoprenintaj la 12an Internacian ILEI-Konferencon.

kelkaj ŝanĝoj en IPR

Nun, post kelkaj trankvilaj jarkolektoj, la estraro de ILEI decidis espluati la favorajn kondiĉojn, kiujn ofertas la nuna preslando, por altigi per plua ŝtupo la kvaliton de la servoj, kiun IPR liveras al siaj abonantoj.

Unua modifo konsistas en oficialigo de la disdivido de la redakta kaj de la teĥnika taskoj, jam fakte provita dum la pasintaj jaroj, samtempe kun la ŝanĝo de la nomo de la faka redaktoro.

De morgaŭ, do, sendu viajn artikolojn, fakajn kaj abundajn, al **Helmut Sonnabend, Im Den Horstwiesen 42, D-315 Peine, FRG.**

Samtempe, la firmao kiu kompostas kaj presigas IPRn, ankaŭ transprenas la zorgon de dissendado al la abonantoj, tiel permesante ŝparon en ricevotempoj (ĝis nun la landaj sekciestroj ricevis pakajon por sialandaj membroj, kaj devis prizorgi plusendadon) kaj drastan tranĉon en la elspezoj de la sekcioj mem. Tio tamen postulas akuratan liveron de la landaj adreslistoj, jam en la lastaj monatoj de la antaŭa jaro. La sekciestroj sendu do liston de la abonantoj, kiun ili kolektis por 1979, al la kasisto de ILEI, kun samtempa transpago: **Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29 Lund, Svedujo.**

Plendojn pro nericevo de numeroj, eraraj adresoj kaj simile, oni tamen sendu rekte al: **Edistudio, via Giordano Bruno 8, I-56100 Pisa, Italujo,** se necese kun samtempa kopio al respondecaj instancoj de ILEI.

Bruĉjo Kasini.

Estraro de ILEI

prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, In der Horstwiesen 42, D-315 Peine, Fed. Resp. Germanujo.
 vicprezidanto: direktoro Johano Ingusz, Liget út.40, H-1102 Budapeŝt X, Hungarujo.
 sekretario: d-ro Mario Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa, Italujo.
 vicsekretario: Gaston Turin, 43 rue E. Magnin, F-25300 Pontarlier, Francujo.
 kasisto: Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo.

Sekciestroj de la Ligo

Aŭstralujo: prof. Ivan Th. Maddern, Box 411, Morwell, Victoria 3840.
 Aŭstrujo: Ernst Rixner, Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno.
 Belgujo: Germaine Pirlot, Kemmelbergerstraat 3-5/b, B-8400 Oostende.
 Brazilo: Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.
 Britujo: Hilary Chapman, 7 fairacre road, Barwell, Leicester LE9 8HH.
 Bulgarujo: Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia.
 Danujo: Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre.
 Finnujo: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
 Francujo: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
 F.R.Germanujo: Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Ateno (816).
 Grekujo: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
 Hispanujo: Zsuzsa Bacsay, PF 139, H-1368 Budapeŝto.
 Hungarujo: Baldur Ragnarsson, sogavegur 170, Reykjavík.
 Islando: Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv.
 Israelo: d-ro Catina G. Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa — pĉk. 22/2883.
 Italujo: Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
 Japanujo: d-ro Miodgrad Stojanoviĉ, Duruntorska ul.2/iv-32, YU-11000 Beograd.
 Jugoslavujo: Robert Hoegener, 4 rue des charbons, Esch/Alzette.
 Luksemburgo: vidu Nordameriko.
 Kanado: prof. Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin.
 Kolombujo: —
 Koreujo: prof. Eugene Raveloson, BP 127, Tananarive.
 Malagasujo: Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl.
 Nederlando: John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266.
 Nordameriko: Margrete Landmark, Universitet i Oslo, Psykologisk Institutt, Postboks 1094, Blindern, Oslo 3.
 Norvegujo: Gwenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt.
 Nov-Zelando: —
 Polujo: —
 Rumanujo: —
 Sanmarino: prof. Marina Michelotti, via xxv marzo 73, I-43031 Rep. San Marino.
 Sovet-unio: Johannes Palu, Sólme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV.
 Svedujo: Nikolaj Starodubĉev, poŝtrestante, SU-340047 Doneck.
 Svisujo: Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund.
 Usono: Olivier Tzaut, CH-2610 Mont-Soleil.
 vidu Nordameriko.

Izolitaj membroj

Ĉeĥoslovakujo: Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hrimedzice Okr. Pribram.
 Germana D.R.: d-ro Till Dahlenburg, Str. d. DSF 13, DDR-2722 Brüel.
 Irano: M. Saghafian, širas ave., Emdadi st. 22, Vanak, Teheran 19.
 Kubo: Pedro Pablo Lamas Díaz, apartado 223, Ciego de Avila.
 Singapuro: Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14.
 Zairujo: Antoine-Samuel Ngangu, BP 13, Lukala, Nkandu.

Kunlaborantaj organizoj

FIMEM: Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne.
 SAT: Sennacieca Asocio Tutmonda.
 UEA: Universala Esperanto-Asocio.
 UNESKO: Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO – IPR

organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI
en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

Aperas trifoje jare

Redaktas: Gaston Turin, 43 rue E. Magnin, F-25300 Pontarlier, Francujo

Poŝtĝirkonto: Stockholm 682 117-7, Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29 Lund, Svedujo

Jara abono: 20 svedaj kronoj

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI

Nemembroj de ILEI pagu al la supre indikita konto.